# DIA REGNO

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (890) • 2011 •

Featherstone, Neil kaj Jackson en Annan Court 1989



Polnický kaj Leja 2002 en Berekfürdő





Ekskurso 1998 en Nantes



Kongreso 2000 en Janské Lazné.

Kongresa ekskurso 1992 en Velence



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 325 615 651; 💻 polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de KELI: BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
☎ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| La ĉefurboj de la centjara KELI | 99 |
| Religio estas opio de la popoloj | 105 |
| Mi memoras | 106 |
| Eterneco en iliaj koroj | 107 |
| Invito al kongreso 2012 – aliĝilo | 109 |
| Leteroj inter Hoog kaj Cseh | 112 |
| Ŝercoj kolektitaj (6) | 114 |
| Evidente vivu: vid-x | 115 |
| Kiel vortumi la kristanan bazon de KELI | 116 |
| La tero granda tablo estas | 117 |
| Informetoj | 118 |
| Eterneco | 120 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Jam estas novembro kaj nia gazeto Dia Regno malfruas. Pro labora kaj familia kaŭzoj, mi/ni parte translokiĝis kaj tio rabis multe da tempo. Tamen la redaktora adreso en la kolofono daŭre taŭgas. Kelkaj formalaj ŝanĝoj okazis kiujn mi petas vin observi: 1) la sekretario havas alian retadreson, 2) la kasisto nun estas alia, 3) KELI havas novan bank-konton (vidu ankaŭ sur paĝo 118).

Kiel kutime en la kvina numero vi trovas la aliĝilon por la sekvontjara kongreso. Ĉi-foje (2012) la kongreso okazos en Germanio. Pro la malfrua decido pri la kongresejo, mi ĉi-numere bedaŭrinde ne povas prezenti la lokon pli bone. Sed tio ne baru vin aliĝi!

Ĉar la sekvonta numero venos al vi en la dua duono de decembro, mi nun kaptas la okazon deziri al vi belajn adventajn semajnojn kaj bonan kaj trankvilan kristnaskan preparadon.

# La ĉefurboj de la centjara KELI

## Prelego dum la KELI-kongreso en Poděbrady 2011

Philippe COUSSON, FR

En la revuo de UEA, Esperanto, troviĝas rubriko nomata: loke, fake, persone.

En nia revuo Dia Regno mi jam prezentis kelkajn gravajn personojn en la vivo de KELI. Nun mi volas prezenti al vi kelkajn lokojn, kiuj ankaŭ estis gravaj en nia jarcenta historio. Tio ne estos sistema historia pritrakto.

La ĉefaj fontoj de mia prelego estos la libro *Nia Historio*, kaj mia memoro pri homoj kaj renkontiĝoj. Mi certe ne estas inter ni la plej malnova ĉeestanto de KELI-kongresoj, sed dum pli ol 30 jaroj mi havis la okazon renkonti multajn homojn, viziti multajn lokojn, sperti diversajn okazaĵojn.

La lokojn, kiujn mi citos, mi deziras nomi la ĉefurboj de KELI. Ni ne estas kiel niaj katolikaj gefratoj, kiuj havas unu ĉefurbon, Romo. Ni ne havas pilgrimlokojn. Tamen, la KELI-anoj ĉiujare pilgrimas, sed al ĉiam ŝanĝanta pilgrimejo.

La unua menciinda loko estas la urbo Antverpeno. En ĝi, la 25-an de aŭgusto 1911 fondiĝis io, kio poste fariĝis nia ligo, KELI. Ili ne estis multaj en tiu Universala Kongreso, sed ili antaŭvidis gravan rolon al la lingvo Esperanto en la kristanaj rilatoj kaj en la misiado. Kiam oni rigardas la foton antaŭ la konstruaĵo kie okazis la kunveno, oni tuj vidas, ke ne temas pri moderna foto pro la vestaĵoj. Sur la foto Henk de Hoog identigis homojn el Anglujo, Skotlando, Norvegujo, Francujo, Belgujo, Germanujo, Usono. Jam tre internacia societo.

Tiu dato estas la "principa komenco", ĉar pro diversaj malfacilaĵoj la efektiva komenco okazis du jarojn poste en Berno, Svislando. La unuaj jaroj vidis du malsamajn viziojn de la movado. Tiu kiun mi nomos la angla politiko estis tuja uzo de la lingvo, per literaturo, himnoj, Diservoj kaj misiado, kaj la alia post Hübner, kiu celis unue la agnoskon de Esperanto en grandajn kristanajn organizojn, kiel KAJV (YMCA aŭ UCJG en angla aŭ franca mallongigo) aŭ Kristana Celado (Christian Endeavour).

Por resumi, Antverpeno estas grava por ni, sed ĝi estas nia teoria naskurbo. Homoj tie naskis nin, sed la naskiĝo daŭris pli ol unu kunvenon.



Gildodomoj en la ĉefa placo de Antverpeno

La dua urbo, pli ĝuste urbeto, sed ĉefurboj ne ĉiam estas vastaj, estas Mülheim en Germanio. Fakte, ĝi devus esti la unua, ĉar tie loĝis Paul Hübner kaj de tie li eldonis la unuan numeron de tio, kio poste fariĝis nia revuo *Dia Regno.* Tio okazis en februaro 1908. De kvin (5!) abonantoj por la dua numero, la bulteno kies titolo ankoraŭ ne fiksiĝis, havis en decembro 1908 jam pli ol 80 abonantojn. La agado de nia organizo aŭ de ties premisoj okazis tie en Mülheim dum multaj jaroj. Komprens-eble troviĝis ankaŭ aliaj homoj kiuj aktivis en aliaj lokoj, sed la centro troviĝis precipe ĉe Hübner, tio estas Mülheim.

Por nia tria ĉefurbo, mi lasas jarojn, kaj alvenas post la dua mondmilito. Multaj vundoj estis tiam en la karnoj, en la spiritoj. Kaj venis nia unua kongreso. Ĝi okazis en malgranda sveda urbo, Tostarp. Mi pensas ke nun, ne plu troviĝas inter ni homoj kiuj ĉeestis ĝin en 1948 [redaktora rimarko: fakte jes, ekz. Arne Lundkvist]. Ĝi estas por ni ĉefurbo de la kristana paco kaj de la nova espero, komenco de nova erao, kiam la kongresoj fariĝas la ĉefa elemento de nia vivo, apud la revuo. Mi kompreneble ne komentos ĉiujn niajn kongresurbojn. Mi mencios kelkajn pro la tiam okazintaj simbolaj eventoj.

Sed antaŭe mi mencios alian urbon, gravan pro la kristana esperantismo. Ĝi fakte estas en si mem granda urbo, vera ĉefurbo. Temas pri Londono. En ĝi aŭ apud ĝi disvolviĝis tre gravaj agadoj por ni. Ekde 1909 ili organizis esperantlingvajn Diservojn, kiuj eble daŭras ĝis hodiaŭ. Pro tio, ili ankaŭ tradukis kaj kunmetis himnaron. Ankaŭ en Anglio estiĝis la grupo kiu ebligis la eldonon de la Esperanta Biblio.

Pro la Biblio mi povas aldoni plian britan ĉefurbon en nia listo. Temas pri Edinburgo, kie en 1926 estis solene dediĉita la Esperanta Biblio. Tiun eventon ni jubileis en la kongreso en la sama urbo en 1977, mia unua KELI-kongreso, fakte mia unua esperantista kongreso entute. Eble pro tio mi metis Edinburgon en la liston.

En pli proksimaj jaroj, alia ĉefurbo estis grava en nia movado, ĉar en ĝi okazis kunvenoj kiuj havis konsekvencojn por ni en la formo de multaj kongresoj. Tiu kvina ĉefurbo de KELI estas Budapeŝto. Mi volas nepre mencii la biblian studgrupon kiu kunvenis en la Reformita Preĝejo de la edzo de Eva Farkas. Pro tio establiĝis en la urbo sufiĉe forta kristana esperantista grupo. Kaj krome tio estis dum periodo kiam esti kristano ne estis facile. En la sama vejno, mi povus apudmeti en la sama spirito la "muzikan" grupon de Rudolf Horský en Praha.

Tute alia aspekto de la aktivado de la KELI-anoj: misiado. Kaj la ĉefurbo



Rudolf Horský kun edzino. Fotis Åke Ahlrén

de tiu agado troviĝis dum multaj jaroj en Svedio, en la malgranda vilaĝo Östansjö. Tie vivis la paro Sandgren, kiuj ĉu per prelegvojaĝoj, ĉu per korespondaj kursoj, ĉu per sendita literaturo dissendis la Evangelion per Esperanto. Se vi ne jam aŭdis pri Esperanto Misio, vi certe mistrafis unu el la flankoj de KELI. Se vi jam ne havis en la manoj unu ekzempleron de *Greneroj por la animo*, vi ankoraŭ ne konsciiĝis pri la esperantlingva kristana literaturo.

Kvankam tio ne okazis en Östansjö, kvankam ĝin ne prizorgis la sama paro, mi ne volas forgesi la elsendojn de IBRA-radio. Tio estis en la antaŭa periodo, kiam ne ekzistis la reta radio. Mi ne scias ĉu ni havus la rajton enretigi tiujn jam jardekajn elsendojn. Eble ili nun malmodiĝis. Estis provoj trovi posteulojn por tiu misia agado, sed ĝis nun nenio vere daŭre efektiviĝis. Nia misia ĉefurbo restas Östansjö, eĉ se historia ĉefurbo.

Por la sekvanta ĉefurbo de nia ligo, mi revenas al nia revuo. Dum multaj jaroj ĝi estis eldonita en la sama nederlanda urbo, en la sama presejo. Tiu urbo, kies nomo troviĝis sur la kovertoj kiuj liveris nian revuon, estas Hardinxveld. Por multaj dum multaj jaroj, tiu nomo signifis KELI revuon.

Tamen, malgraŭ granda fideleco kaj pro ŝanĝo de prezo se mi bone memoras, ni transiris al alia presisto, en nia unua ĉefurbo, nome Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno. Tio daŭris dum kelkaj jaroj, kaj post pola periodo en Czeladź, nia revuo alvenas nun al vi el nia ĉijara kongresa urbo, nome Poděbrady, ĉar la



Karl-Olof kaj Anna (Alamo) Sandgren

sendadon prizorgas Pavel Polnicky.

Do, post Mülheim, post Hardinxveld, kaj ankaŭ aliaj, nia nuna ĉefurbo por sendado de Dia Regno estas Poděbrady.

Vi ĉiuj scias, ke krom sendado de *Dia Regno*, nia frato Pavel deĵoras ankaŭ kiel sekretario. Tio havas kiel konsekvencon ke multaj leteroj kaj mesaĝoj venas el la sama urbo Poděbrady.

En mia mallonga memoro estis du tiaj ĉefurboj de KELI, ĉar en ili loĝis du famaj sekretariinoj de KELI, ambaŭ virinoj, ambaŭ nederlandaninoj.

La unua el tiuj urboj estas Ede en Gelderland. En ĝi loĝis Tini Putto. Mi ne priserĉis ekzakte kiom da jaroj ŝi estis sekretariino, sed multajn. Mi supozas ke restas tamen kelkaj ĉi tie kiuj ankoraŭ memoras ŝin.

La posta sekretaria ĉefurbo estis Alphen a/d Rijn. En ĝi daŭre loĝas Els van Dijk. Ankaŭ ŝi multajn jarojn funkciis kiel sekretariino.

Krome, troviĝas alia urbo nederlanda, kiu laŭ mi devus esti unu el niaj historiaj ĉefurboj, nome Vlaardingen. En ĝi loĝis nia multjara redaktoro, Jan van Keulen. Li eĉ sukcesis arigi ĉirkaŭ si grupon da tradukistoj, kiu aperis kiel “Kolektivo

Vlaardingen". Mi havis la okazon viziti lin en lia apartemento. En la sama urbo tiam loĝis ankaŭ alia grava homo por la Biblio, kiu tradukis la duakanonajn librojn, Gerrit Berveling. Ankaŭ en Vlaardingen loĝis nia multjara kasisto Leen Hordijk. Do urbo multflanke unu el niaj ĉefurboj.

Mi nun daŭre estas en nia dua duonjarcento. Mi elektis kelkajn kromajn ĉefurbojn, gravajn por nia historio, kaj ankaŭ kiel simboloj por nia kristana evoluo.




Gravega kongresa urbo, kiu devas resti kiel komenco de nova erao, kaj kiu meritas esti nomata unu el niaj ĉefurboj, estas fakte ne tre granda urbo, en Germanio. Temas pri Limburg a/d Lahn. En 1968 okazis tie la unua ekumena esperantista kongreso, komuna al KELI kaj IKUE, sub la gvidado de tri personoj, unue Adolf Burkhardt, prezidanto de KELI, due Jacques Tuinder, tiam prezidanto de IKUE kaj trie Stefan Maul. Jam de la komenco estis diskutoj en KELI pri la "vera kristano". Tiu kongreso komuna kaŭzis malkontentecojn ĉe kelkaj membroj de KELI kaj ĝojon ĉe kelkaj aliaj. Nun oni multe pli bone komprenis la grandan signifon de tiu komenco. Post tiu unua epopea kongreso okazis multaj aliaj ekumenaj kongresoj. Ni restas malsamaj, sed ni nun konsideras la aliajn kiel fratojn en Kristo, eĉ se ni ne diras kaj praktikas nian kredon same.

Ni do kongresis samloke samtempe, sed restis kaj restas la disiĝo ĉe la Diservo, kaj ĉefe ĉe la Sankta Manĝo. Tamen ni povis profiti mallongan periodon, kiam tio estis pli facila, relative pli facila, kun ebleco de provoj.

En du el tiuj ekumenaj kongresoj okazis tiuj provoj. Simbole, tiuj kongresejoj povus ankaŭ fariĝi ĉefurboj de KELI, aŭ almenaŭ de ekumena esperantismo.

La unua ekumena kongreso kun tia sperto estis Annan Court, en Britio, en 1989. Tiam oni celebris la Sanktan Manĝon paralele, sur du apudmetitaj tabloj, per la samaj vortoj. Amuze eĉ estis kiam, ĉe la disdono, la homoj povis elekti inter la katolikaj pano kaj pokalo aŭ la protestantaj, sed montriĝis ke estis nur unu vico en kiu la homoj elektis unu aŭ alian disdonanton. Troviĝis pli da protestantoj, kaj la katolikaj pastroj, vidante neniun plu veni al ili formanĝis ĉion antaŭ ol la vico elĉerpiĝis, kaj en la fino troviĝis katolikoj kiuj ne povis komunii.

Tiu komunia Diservo en Annan Court estis jam forta paŝo, tamen, pli forta paŝo okazis kelkajn jarojn poste, kaj pri tio mi ĉiam memoros.

Estis en 1992 en Velence, malgranda

hungara urbeto apud lago. Tie la komunia Diservo okazis laŭ la liturgia teksto de Lima, ne plu paralele sed vere komune, kun sinsekva legado de la tekstoj, kaj unu sola pano kaj pokalo. Ne plu mi vidis tion ie ajn, en Esperantujo aŭ aliloke. Mi ĉiam konservos en mia memoro, kaj se vi konas lin, vi komprenos, kiam, ĉe la tablo kie ni kuncelebris kun aliaj, mi ricevis la panon kaj pokalon de Jozef Zielonka. Li eĉ estas unu el la malmultaj kiuj havis la okazon veni al mia fora domo. Do ankaŭ Velence estas unu el simbolaj ĉefurboj de KELI. Malgraŭ ke, se mi bone komprenis, ke tie partoprenintaj katolikaj pastroj reveninte en hejmon estis avertitaj.

Kiam oni parolas pri ekumena agado en Esperantujo, oni tuj vidas alian urbon, kiu kvankam nerekte ligita al KELI, meritas esti unu el niaj ĉefurboj. Multaj certe komprenas ke mi parolas pri Villingen-Schweningen. En tiu duobla urbo loĝas katolika pastro kiu motoris esperantan ekumenismon dum multaj jaroj. Multajn iniciatojn li prenis. Li eldonis germanlingvan bultenon. Li helpegis por eldono de la ekumena Diservo-libro *Adoru*, por la lasta eldono de la Biblio. Kompreneble, se li estus sola, tio ne efikus, sed sen li, mi dubas pri la rezultoj. Villingen-Schweningen, alia simbola ĉefurbo de KELI. Mi pensas pri Bernhard Eichkorn.

Apud li troviĝis du homoj, Albrecht Kronenberger kaj Adolf Burkhardt, nia dufoja multjara prezidanto. Kiam li aperas unue kiel prezidanto, li loĝis en Gechingen kie li pastris. Li poste translokiĝis en Bissingen. Mi ne povas diri kiu el la du, se ne ambaŭ, devus esti ankaŭ unu el niaj historiaj ĉefurboj. Tiom da aferoj por nia ligo naskiĝis en ili. Tiu ĝisosta ŝvabo ne nur estis pastoro luterana, interpretisto de la angla en



Adolf Burkhardt



Historia urbodomo kaj bazareja puto en Aalen. El Vikipedio, fotis Memorino

konferencoj, prezidanto de KELI, sed li estis ankaŭ la prizorganto de la biblioteko de la Germana Esperanto-Instituto. Tiu biblioteko dum multaj jaroj okupis almenaŭ unu ĉambron de la sinsekvaj pastraj domoj. Post lia emeritiĝo, oni devis trovi lokon por la kolekto, kaj oni trovis bonan ejon en la urbo Aalen, en la urba biblioteko, kie nun direktoras ĝin Karl Heinz Schaeffer. Kaj tiu alia ŝvaba urbo estas ankaŭ simbola por KELI en tio ke en la biblioteko troviĝas niaj kongresaj albumoj. Nia kongresa memoro troviĝas en Aalen, alia grava urbo por ni, alia nia ĉefurbo. Aŭ ĉu la tuta Ŝvabujo estu ĉefurbo por KELI ?

Nun mi volas reveni al Nederlando, ĉar en ĝi troviĝas alia urbo al kiu multaj sendis leteron aŭ eble monon aŭ pakaĵon. En tiu urbo loĝis jam menciita homo, homamanto, Diamanto, kiu ne toleris ke iu ne kapablas vidi kiam eblas kuraci. En Heemskerk loĝis Jacques Tuinder. Se vi memoras en pli antaŭaj kongresoj kiam li provis vendi pupojn kaj aliajn donacojn kiujn li ricevis, vi povas imagi kia estis lia domo, kiu foje similis al stokejo de donacoj por helpi al la blinduloj. Li loĝis en Heemskerk, sed li travojaĝis preskaŭ la tutan mondon, ĉar helpendaj homoj troviĝas ĉie. Ni certe ne forgesos lin, kaj Heemskerk daŭre restos unu el niaj ĉefurboj.



Laiconas kaj Prutko en Velence 1992

La lastaj lokoj, kiujn mi mencios, markas evoluon en la tempoj de Eŭropo. Pluraj inter ni certe memoras la rubrikon en *Dia Regno* kiu nomiĝis*, A kaj A, Adopta kaso.* Temis pri helpo al la membroj en la tiel nomataj "nepagipovaj landoj", metaforo por diri "en la komunismaj landoj".

En diversaj kongresoj aŭ okaze de personaj renkontoj, oni aŭdis pri tio, kio okazis en tiaj landoj.

Mi volas speciale mencii du, eĉ tri, el niaj kongresaj urboj, pro la simbolo.

La unua estas Brno. Post la grandega sukceso de la kongreso en Debrecen, Hungario, 1966, fakte teorie antaŭ-kongreso de la Universala Kongreso en Budapeŝto, en tiu ĉeĥa urbo estis planita kaj komplete preta kristana esperanto-kongreso. Tio estis en 1970. Ses semajnojn antaŭ la komenco de la kongreso la ricevitaj permesoj estis nuligitaj. La sukceso estis tro granda. Kaj la organizantoj devis trovi tre rapide alian kongresan urbon. Feliĉe ili trovis Klagenfurt, ne tre malproksime, sed multaj orient-eŭropanoj kompreneble ne povis veni. Do mia antaŭlasta simbola ĉefurbo neniam estis efektiva kongresurbo.

La lasta estas Kaunas en Litovio. Tio estis en 1995. Kvin jaroj antaŭe, tie troviĝis Sovetunio. La etoso de tiu ekumena kongreso estis sufiĉe bona, kvankam ni multe paŝis en la urbo de unu loko al alia, multe pli ol ni faras

kutime. Sed la praktikaj cirkonstancoj estis teruraj, kelkaj diris primitivaj. Mi tamen supozas ke nun, ili ne nur riparis sed modernigis la ekipaĵojn, akirante novajn. Malgraŭ tiu aspekto, tiu kongreso restas por mi simbola kongreso, kiun ni ŝuldas al Erikas Laiconas.

Dum mi prezentis ĉiujn ĉi tiujn ĉefurbojn de KELI, mi ne povis eviti la mencion de homoj, ĉar ili konsistigas



Pavel Klimeš kaj Philippe Cousson.
Fotis Václav Pospíšil

nian ligon. Multajn lokojn kaj homojn mi ne menciis. Neniu ofendiĝu. Ĉiu havis sian rolon kaj gravecon.

Tamen, post jarcento mi volas unue danki al nia Dio, kiu provizis al ni tiun ĉi rimedon por komuniki kaj dividi nian komunan fidon, kiu permesis al ni sperti la komunecon en nia Sinjoro Jesuo Kristo, malgraŭ ke restas malkonsentoj inter la Kristanoj, malkonsentoj kiujn ni ne povas nianivele forpreni, sed ni atestas ke komuna kristana praktiko kaj penso eblas inter kredantoj el diversaj lingvoj kaj kulturoj. Tio estas la atingo de tiu unua jarcento de KELI.

Mi finos citante la du finajn frazojn de la libro *Nia Historio* de Henk de Hoog:

> *"Ni scias batali por bona afero. Ni trankvile daŭrigu."*

Mi dankas.

# Religio estas opio de la popoloj

Per tiu senreplika aserto, Karl Marx denuncadis la danĝeron de la religioj. Ne malpravis Marx. Se iu religio estas uzata de riĉuloj kaj povtenantoj por gardi la regadon super amaso da malriĉuloj kaj subprematoj, ĝi vere estas opio, tio estas narkotaĵo kiu senefikigas la energiojn kaj la vivigajn fortojn de la popolo. Sur la benko de la akuzitoj, unuavice inter la religioj, estis laŭ Marx, ĝuste kristanismo, kaj aparte la mesaĝo de Jesuo konata kiel "beatecoj".

Gekaraj, vi povas legi "*Ĉu opio aŭ adrenalino?*" ĉi tie:
http://www.studibiblici.it/ESPERANTO/tekstoj.html

Plej amike
*Marco Menghini*

# Mi memoras

Mi finis mian studadon ĉe la komerca gimnazio en Stokholmo en la jaro 1939. Post la militista servo mi deĵoris diversloke en Svedio. Februare 1947 mi komencis en Malmö. Mi vidis, ke tie iĝos Esperanto-kongreso en 1948 kaj pro tio mi aliĝis al komenca kurso. Ni estis 25 gejunuloj.

Sur la placo de St. Knut mi aŭskultis Anna Alamo, kiu rakontis, ke la unua kristana kongreso okazos en Tostarp. Ŝi diris, ke venos 22 el Nederlando kaj petis min aranĝi tranoktadojn en privataj hejmoj. Tio bone sukcesis. Dum la kongreso Anna fianĉiĝis kun Karl-Olof Sandgren kaj ili geedziĝis en septembro en Stokholmo.

Dum la kongreso mi konatiĝis kun Mijntje van Steenwijk el Rotterdamo. Ni iris al la lago Finja kaj ŝi diris "ik heb zand in schoen". Mi pensis ke la lingvo devas esti facila kaj mi legis Niederländische Sprachlehre. Post tio la nederlanda lingvo estas mia dua lingvo.

Inter la nederlandanoj mi dum multaj jaroj havis kontakton kun Dirk de Boer, C.P. Brakké, R. van Spronsen kaj de Hoog. Post Tostarp okazis la UEA-kongreso en Malmö. Dum la jarkunveno de KELI, Ivar Karlsson fine povis demeti la prezidantan taskon. Unu jaro fariĝis por li dek jaroj, 1938-1948. Multon KELI ŝuldas al tiu simpatia, modesta viro, kiu helpis KELI dum multaj malfacilaj jaroj. KELI ekhavis jenan estraron: Erik Carlén, prezidanto, D de Boer sekretario, Karin Larsson kasistino.

Dum la dua semestro de la Esperanto-kurso mi iĝis sekretario de la klubo en Malmö. Mi aranĝis kunvenojn por Anna Alamo en la regiono. Fariĝis KELI-grupoj en Malmö, Göteborg, Lund kaj Norrköping.

Mijntje studis la svedan lingvon en Rotterdamo. Kiam ŝi vizitis min ŝi ankaŭ kantis nederlandajn kristnaskajn kantojn en la Malmö-klubo. Nia geedziĝo okazis la 1-an de majo 1951. Mi laboris tri jarojn en Malmö kaj poste laboris en Karlskrona. Mia edzino ricevis laboron kiel sekretario kaj pro tio mi kun Mijntje translokiĝis al la domo de miaj gepatroj. En Stokholmo mi partoprenis en la granda KELI-grupo kaj en la Grupo Esperantista.

*Arne Lundkvist*





# Eterneco en iliaj koroj

de Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

La Biblio estas tre klara ke la kristana fido estas la sola vera religio. Jesuo diris: *"Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi."*(Joh. 14,6) Ni legas ankaŭ: *"Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo (ol la nomo de Jesuo Kristo), donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj."* (La Agoj 4,12) Multaj kristanoj kaj ne kristanoj havas demandon: Do, kio pri la personoj kiuj neniam vidis Biblion kaj neniam sciis pri Jesuo Kristo?

En la sama libro de Agoj, en la ĉapitro 10, estas rakonto pri Kornelio, centestro de la Roma Armeo. Kornelio estis tre bona viro kiu preĝis al Dio konstante kaj li donis multajn almozojn al la malriĉuloj. Malgraŭ ĉio tio, li ne konis Jesuon; li ne estis savita. Dio sendis al Kornelio anĝelon kiu diris ke Kornelio devis sendi virojn al urbon Jafo kie ili trovos Petron en domo de tanisto. (Antaŭe Kornelio neniam konis Petron.) Laŭ la ordono de la anĝelo, Kornelio sendis virojn al Jafo, kaj li alportis Petron al urbegon Cezarea. Petro predikis pri Jesuo Kristo al Kornelio kaj al liaj parencoj kaj amikoj kunvokitaj en la domon de Kornelio. Ĉiuj ili fidis al Jesuo kaj estis baptitaj.

Dio multfoje estas respondinta per similaj manieroj al koroj kiuj malsatis kaj soifis por koni Lin. Ekzemple, mi havas libron kun titolo "Eternity In Their Hearts" ("Eterneco En Iliaj Koroj"). Don Richardson, la aŭtoro, skribas ke multaj indiĝenaj triboj ĉirkaŭ la mondo havas tradiciojn kaj legendojn pri la vera Dio, la Kreinto. La prapatroj de tiuj popoloj forlasis ilian scion de la Kreinto kaj ekadoris la demonojn kaj la idolojn. La prapatroj ankaŭ perdis la libron per kiu la Kreinto atestis pri Si Mem. Tio estis la kazo de dek triboj en Birmo, Hindujo, kaj Ĉinio.

La "Lahu" tribo de Birmo havis legendon pri "Gui'Sha" – la Kreinto de ĉio – ke Li donis al iliaj prapatroj Sian leĝon skribitan sur kukoj de rizo. Sed okazis tempo de malsatego kaj la prapatroj manĝis la kukojn. Tio estis tre granda perdo. La Lahu popolo havis "profetojn de Gui'Sha" kiuj subtenis vivante la esperon en la koroj de ilia popolo, ke Gui'Sha sendos helpon al ili. Laŭ tiuj profetoj: *"Je la ĝusta tempo, Gui'Sha mem sendos al ni blankan fraton kun blanka libro enhavanta la blankajn leĝojn de Gui'Sha – la vortoj perditaj por niaj prapatroj antaŭ longe. Tiu blanka frato alportos la perditan libron al niaj propraj hejmoj!"*

Iuj el la anoj de la Lahu eĉ surportis ĉirkaŭ iliajn manradikoj ŝnurojn, kiuj simboligis ilian sklavecon al la demonoj, la malbonaj spiritoj. Tiuj ŝnuroj ankaŭ montris la bezonon, kiun la Lahu

havis de dia liberiganto, kiu tranĉos la ŝnurojn.

En la jaro 1890, amerikana misiisto, William Marcus Young, venis al la urbegon Kengtung, en Birmo. Iun tagon li iris al la bazaro. Li laŭte legis la Dek Ordonojn. S-ro Young alte levis la Biblion kaj – kun la suno brilanta sur ĝiajn paĝojn – li komencis prediki pri la leĝoj de "la vera Dio". Tiu sama tago, iuj viroj el la Lahu tribo malsupreniris el la malproksimaj montoj por komerci iliajn varojn. Ili vidis la misiiston. Ili rigardis lian blankan vizaĝon kaj la blankajn paĝojn de la libro en lia mano, kaj ili aŭskultis lian klarigon pri la leĝoj de Dio enhavitaj en tiu libro.

Tiuj viroj el la Lahu tribo ege emociiĝis. Ili ĉirkaŭis William Marcus Young kaj ili petegis lin ke li sekvu ilin al la montoj. Ili preskaŭ forkaptis la misiiston! Ili diris al li: *"Nia popolo atendas vin dum multaj jarcentoj. Ni eĉ havas domojn konstruitajn en iuj el niaj vilaĝoj pretajn por via alveno."* Iuj el la viroj montris al la misiisto braceletojn de ŝnuro. Ili diris: *"Ni la Lahu surportis ŝnurojn kiel ĉi tiuj ek de la pratempoj. Ili simboligas nian sklavecon al la malbonaj spiritoj. Sola vi, kiel mesaĝisto de Gui'Sha, povos fortranĉi ĉi tiujn mankatenojn – sed nur post ol vi portos la perditan libron de Gui'Sha al niaj hejmoj!"*

Tre mirintaj, S-ro Young kaj misiistoj de alia tribo sekvis la Lahu virojn al la montoj. Miloj kaj miloj da Lahu iĝis kristanoj. Tiel granda estis la laboro ke S-ro Young bezonis la helpon de siaj du filoj, Haroldo kaj Vicento. Ili estis nur knaboj sed ili iĝis instruistoj de la Biblio. Ek de ilia infaneco, ili vestiĝis kiel Lahu. Ili laboris, ridis, kaj ludis kun la Lahu. Harold kaj Vicento parolis la Lahu lingvon pli bone ol la anglan lingvon. Kiam Vicento estis plenaĝulo, li tradukis la Novan Testamenton al la Lahu lingvo.

Ĝis lia morto je 1936, William Marcus Young, liaj filoj, kaj iliaj helpantoj baptis 60 000 homojn el la Lahu tribo en la kristana fido. S-ino Nelda Widlund, filino de Vicento Young, kaj nepino de William Marcus Young persone rakontis ĉi tiun historion al S-ro Richardson.

William Marcus Young laboris ankaŭ inter la Wa tribo, sovaĝa tribo de Birmo. La anoj de tiu tribo tranĉis kaj forportis la kapojn de iliaj malamikoj. La Spirito de Dio moviĝis ankaŭ inter tiu tribo kaj preparis ĝin por la alveno de la evangelio de Jesuo Kristo.

---

La verkisto sin jene prezentas:

Mi estas esperantisto ek de la jaro 1987. Mi estas servinta kiel misiisto en Bolivio (kvin jarojn kaj duonon), Porto Riko (dek tri jarojn), kaj la Respublika Dominikana (du jarojn). En Usono mi estis pastro kaj misiisto en suda Teksaso ĉe la landlimo kun Meksiko (dek ok jarojn), kaj pastro de hispana preĝejanaro en la ŝtato Arkansas (sep jarojn kaj duonon). Mi emeritiĝis en la jaro 2008.

# Germana sekcio de KELI

**invitas Vin kore**

al la 62-a KONGRESO

**29.7 – 5.8 2012, ZÖBLITZ, Germanio**

# A L I Ĝ I L O

Persona nomo: ............................................ Familia nomo: ............................................

Adreso: ............................................ Lando: ............................................

Telefono:. ............................................ Retadreso: ............................................

Mi mendas ĉambron: ☐ unu-litan ☐ du-litan ☐ 3-4 litan

Mi estas vegetarano: ☐ JES ☐ NE Kroma informo pri manĝado: ............................................

Mi preferas loĝi kun: ............................................

Dato: .................................. ............................................

subskribo

Organizaj informoj:

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn: ☐ JES ☐ NE

Mi povus prelegi pri : ..........................................................................................

Mi postulus (specialajn dezirojn): ..........................................................................

..........................................................................................................................

Mi alveturos: ☐ trajne ☐ buse ☐ aŭtomobile

kaj alvenos proksimume:..............................................................................

---

Notoj de LKK

**La aliĝilon sendu al:** Pavel Polnický,
Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Telefono : 420 325 615 651
E-mail: polnicky@quick.cz

La kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion en belega naturo. **Zöblitz** estas ĉarma montara urbeto 40 km de Chemnitz kaj estas atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile (parkejo ĉe la kongresejo). La kongresejo estos: Bibel und Freizeitheim Hüttstattmühle, 4 km de la urbeto. Je nia dispono estos 1 – 4 litaj ĉambroj, kelkaj kun necesejo kaj duŝo.

**Kostoj** (Sumoj estas en EURoj)

La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo

| | ĝis 31.12.2011 | ĝis 31.3.2012 | post 1.4.2012 | Restadkosto |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio A : | 20 | 30 | 40 | 150 |
| Kategorio B : | 40 | 50 | 60 | 240 (290)* |

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko
Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj

* unulita ĉambro

- Monsendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-postĝirkonton aŭ pagu prefere al UEA por konto **kelk-p** de KELI

---

## El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- diservo kun sankta manĝo
- prelegoj, kantado
- koncertoj
- jarkunveno de KELI
- tuttaga busa ekskurzo
- duontagaj ekskursoj – pieda kaj busaj (detalajn informojn pli poste)
- akcepto de la urbestro

# Leteroj inter Henk de Hoog kaj Andreo Cseh

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

*En la leter-arĥivo de Internacia Esperanto-Instituto, Hago, troviĝas la korespondaĵo inter Henk de Hoog kaj Andreo Cseh. Ĝi kovras la periodon de 1942-1959. El tiu materialo mi selektis leterojn el 1942-1943, eble interesaj por niaj legantoj.*

*En tiu tempo la germanaj nazioj, okupantaj Nederlandon dum la dua mondmilito malpermesis la uzadon de Esperanto, i.a. kunvenojn de esperantistoj. Ili ankaŭ ordonis en 1942, ke multaj haganoj forlasu siajn domojn en la ĉe-mara kvartalo, por ke la germana armeo povu pli facile kontraŭbatali la albordiĝontajn soldatojn el Britio. Cseh ne plu restis en Riouwstraat 172 kaj De Hoog trovis lokon en Amsterdam.*

Hago, 1942-12-04

Al s-ro A. Cseh,

Same kiel la antaŭan jaron ni decidis doni al nia ordinara decembro-kunveno pli specialan karakteron pro la memortago , la 15-a de decembro. Tiu kunveno (ĉirkaŭ 10 personoj) okazos sabaton, la 19-an en la posttagmezo dome de s-ro De Boer.

Ni invitas ankaŭ vin ĉeesti, se la zorgoj pro la evakuado ne tro premas aŭ ĝenas vin. Estus tre agrable, se vi volus fari al ni alparolon pri ia temo, kiun vi opinias taŭga por tia kunveneto. La elekton ni tute lasas al vi.

samideane, via H. de Hoog

Hago, 1943-07-13

Al s-ro H.de Hoog

Ŝajnas, ke proksimiĝas la fino de la milito, kaj tial pli diligente mi pensadas pri la estonteco/*de Esperanto/.* Ankaŭ kun vi mi volonte parolus pri tio, se doniĝas taŭga okazo. Eble vi faradas vizitojn al Hago. Ankaŭ povas esti, ke mi faros iam viziton al Amsterdamo, kaj tiam ni povos renkontiĝi.

samideane, A. Cseh

Amsterdam, 1943-07-16

Al s-ro A. Cseh,

Certe, ankaŭ al mi ŝajnas ke pli ol 50 elcentoj de la milito estas pasintaj. Bedaŭrinde, ke oni ne povas scii ĉu 51 aŭ 99 %.

Jam dum kelkaj monatoj mi estas korespondanta kun antaŭaj klubestroj kaj prezidantoj de la

N.C.E.V-sekcioj. Ĉiam mi distamtamas, ke estas necese post la milito fondi ion novan, ion pli bonan, pli ampleksantan ol la antaŭmilita disfendita movado. Sed kun bedaŭro mi devas konstati, ke en mia nederlanda, ortodokse-protestanta (do trioble konservativa) rondo la entuziasmo ne estas granda. Oni certe ne aliĝos al unu granda "rondo familia", sed nepre volas restarigi apartan organizaĵon kun aparta organo. Ankaŭ post ĉi tiu  morala kataklismo povus okazi ke praviĝas la vereco de la centjara vorto (iom ŝanĝita) "la esperantistoj estis lernintaj neniom kaj forgesintaj neniom".

Dankon pro viaj afablaj deziroj. La vivo ĉi-tiea estas ankoraŭ pli malfacila ol en Hago. Legomojn oni "malavare" liveras al ni .... unu fojon en semajno. Ni loĝas en tuja proksimeco  de fervoja manovrotereno, do eble ke iam la germanaj bomboj provos detrui ĝin ĉe la ĝenerala retiro. Sed kie trovi sekuran lokon?

Hazarde, ke ĝuste antaŭ fermado de ĉi tiu letero, serĉante en Plena Vortaro la vorton "kataklismo", pri kies uzo mi ne estis certa, mi trovis sub "katedralo" la proverbon: "Por konstrui preĝejeton, oni projektu katedralon." Do, tia estu via projekto.

Salutojn, H.de Hoog

Hago, 1943-07-22

Al s-ro H. De Hoog,

Mia plano /*pri granda esperanta organizo*/ daŭre pli konkretiĝas kaj tial mi volonte parolus kun vi kiel eble plej baldaŭ.  Mi estas preta viziti vin en Amsterdam. Sed unue vi proponu taŭgan tagon kaj horon.

La proverbo de Plena Vortaro estas tre trafa kaj aktuala. Plurfoje mi spertis ĝian pravecon. Sed iufoje mi spertis ankaŭ la malon: projektita preĝejeto iĝis katedralo. Kiel okazos nun?

samideane, A. Cseh



Andreo Cseh

# Ŝercoj kolektitaj (6)

MU Binghua, Ĉinio

- "Ĉu tiu ĉi vesto nuntempe estas la plej moda?" demandas la kliento la vendiston. "Jes, ĝi vere sekvas la modon." "Ĉu ĝi perdos sian koloron, se sub la suno?" "Kial vi tiel demandas? Sciu, tiu ĉi vesto pendis en la montrofenestro jam tri jarojn, sed ĝis nun ĝi ankoraŭ aspektas kiel nova."

- Aro da turistoj el eksterlando venis al ĉina vilaĝo kun tre bela pejzaĝo. Pli-ol-dek-jara knabino de la vilaĝo estis ilia gvidanto. Unu el la turistoj ŝin tre afable konsultis: "Knabineto, bonvolu diri al ni, kiom da grandaj personoj naskiĝis en via vilaĝo?" "Neniu." mirigite la knabino pligrandigis la okulojn: "Tie ĉi ĉiuj naskitoj senescepte estas beboj."

- Patro demandas: "Kia estas via rezulto de la ekzameno por esti licenciulo? Ĉu vi povos diplomiĝi?" Filo respondas: "Mian universitaton mi tro amas. Pro tio mi ne volas ĝin forlasi; mia instruisto jam promesis min restigi por unu jaro."

- Unu homo antaŭ publiko voĉe fanfaronis dirante: "Iam, kiam mi loĝis en Antarktiko, tie mi mortigis plurajn tigrojn!" "Antarktike ne troveblas tigro!" protestis unu el la aŭskultantoj. "Jes, vi pravas, ĉar mi jam mortigis ĉiujn tigrojn sur tiu kontinento."

- Iu persono vendis al eldonejo roboton. Post kelkaj monatoj li denove vizitis la eldonejon. Sed li tamen vidis, ke la nova roboto ankoraŭ ne estas uzata kaj li surpriziĝis. Li do demandis: "Ĉu la aparato ne taŭgas por redakti?" "Ne", respondis la ĉefredaktoro, "nun nia kvanto pliiĝis kaj ankaŭ nia efiko plialtiĝis!" "Kial?" "Ĉiumatene mi avertas miajn oficistojn: la nove aĉetita maŝino anstataŭos vin, se vi ne diligente laboros kaj duobligas vian penon."

- Unu infano diras: "Mia paĉjo estas ŝipestro, la tuta ŝiparo devas lin obei."Alia diras:"Mia paĉjo, fabrikestro, kaj ĉiuj laboras laŭ lia komando." Tiam la tria replikas: "Sed mia paĉjo kapablas dispozicii viajn. Kiam ordonas ilin sidi, ili sidiĝas. Kiam ordonas mallevi la kapon, ili nepre ne ĝin levos." "Kio do li estas?" "Mia paĉjo estas barbisto!"

# Evidente vivu: vidi-x

R Moerbeek, NL

Antaŭ nelonge forpasis la iniciatinto de "Evidente", Jacques Tuinder. Laca li revenis de elĉerpa vidmezurada misio en Tanzanio. Jam antaŭe malsano malebligis al li akompani optikistojn al Kongo. Nun la streĉa agado en Mwanze forprenis lian energion. Saĝe li jam transdonis la prezidon de sia fondaĵo "Zienderogen" (Evidente), kiun li komencis en 1966, kiam li legis, ke per bagatela sumo eblas preventi blindiĝon al afrikanoj. Tiam li alvokis nin esperantistojn: "Esperantistoj, esperigu esperantojn!" Zamenhof ja mem dediĉis unu tagon semajne al la plej malriĉaj pacientoj, etpage-senpage.

Tiu E3 financis veturantajn okulklinikojn, instalis optikajn centrojn aŭ ekipis malsanulejojn per optika fako. Sed ankaŭ por blinduloj mem Jacques fondis lernejojn, aŭ havigis brajlilojn kaj aliajn helpilojn, ĝuste en la plej malriĉaj regionoj en Afriko, Azio, Orienta Eŭropo, Mez-Ameriko. Kaj ofte li sponsoris vidhandikapitajn esperantistojn por partoprenigi ilin en kongresoj. Kostojn li pagadis el la propra poŝo.

Plurajn blindajn infanojn li "adoptis". Plej impresis kaj konsciigis liajn kunlaborantojn lia larĝanimeco: prizonulojn (eble "krimulojn") kaj ciganojn li traktis samrajte.

Tuj post la emocia informo atakis la timo, ke perdiĝos tiel esenca agado. "Tiu Tuinder ne estas anstataŭebla", rimarkigis mia najbaro. Mi konsentis. Tamen… retkorespondo kun la nova estraro de "Zienderogen" evidentigis la gravecon de Esperanto-kontaktoj kaj rego de la brajla skribo.

Kaj ĵus UEA malfermis novan konton de "Evidente": vidi-x. Kvankam ne mankas bonaj celoj en nia Esperanto-movado mem (Fondaĵo Canuto kaj tiel multe plu), la Zamenhofa ekzemplo memorigu nin pri niaj malpli bonŝancaj gefratoj.

Jam la Z-estraro publikigis sian unuan bultenon "Één Ogenblik" (unu momento/ekrigardo) kun multaj memoroj pri Jacques Tuinder, la ĉi-jaraj misioj en Ukrainio kaj Tanzanio, sed pluse plano pri nova misio en oktobro: al Gambio.

La tekston ni povos traduki (en klubo) kaj volonte disponigos rete.

*R. Moerbeek*
r.moerbeek@kpnmail.nl

# Kiel vortumi la kristanan bazon de KELI

Gerrit Berveling, NL

En *Dia Regno* 888 (nr 3 de 2011) mi legis proponon pri statut-ŝanĝo.

La unuan eron, pri nomo kaj sidejo, supozeble ĉiuj tuj akceptas. La nomo ne devas ŝanĝiĝi, kaj ke la sidejo estu formale fiksita ĉe la adreso de la prezidanto Philippe Cousson, se tio estas pli taŭga pro Francaj reguloj, supozeble al neniu estas problemo.

La dua ero laŭ mi persone estas pli grava temo.

Ĉe la nova formulado oni deiras de la nuntempa Ekumena Movado – tute bona ideo. Tamen, kiel la aldonita komento tuj rimarkigas, povas esti problemaĵo por Unitarianoj. Nu, mi kiel Remonstranto same hezitas.

Mi volas iom klarigi tion.

Kiam en 1948 en Amsterdamo oni fondis la *Mondkonsilantaro*-n *de Eklezioj* (la termino laŭ *Deklingva Manlibro pri Politiko* de *Monato*), la Remonstrantoj estis unu el la fondantaj eklezioj. Kiel bazon oni prenis tradician formuladon de Kristanismo laŭ Trinitaria konfeso. La Remonstrantoj pri tiu kontraŭ-unitaria formulado protestis. Tamen per preskaŭa unuanimeco oni ĝin akceptis, farante pro nia eklezio rimarkigon, ke tiu trinitaria konfeso ne nepre estu deviga.

Post tio ni, Remonstrantoj, tamen povis kunfondi la *Mondkonsilantaro*-n *de Eklezioj*. Depost tiam ni daŭre plu kunlaboras en ties organoj, kvankam pro la nunaj reguloj ni eĉ ne plu povus membriĝi: la nunaj postuloj pri kvanto da membroj estas por nia eklezio tro altaj. Ni ja estas nur malgranda, tipe nur-nederlanda eklezio, kvankam kun longa historio kaj multe da gravaj kontribuoj tra la teologia historio. Sed tio estas alia temo.

Mi persone ŝatus proponi por la nova formulado de la bazo de KELI version, kiu multe pli proksimas al vortigo Biblia. Vidu ekzemple en 1 Kor 12:3: *Jesuo estas la Sinjoro*.

Jen mia propono:

> *KELI estas Ligo de membroj, kiuj konfesas Jesuon kiel Sinjoron laŭ la Skriboj, kaj kiuj strebas kune plenumi sian vokiĝon adori kaj servi la unusolan Dion.*

Laŭ mi tio devus esti sufiĉa, por ĉiuj kristanoj de kiu ajn eklezio; ĉio cetera estas teologiaj diskutoj, kiuj laŭ mi ne devas trovi lokon en Statuto.


*Gerrit Berveling*
Remonstranta pastoro.

Karaj, sur la lasta paĝo de DIA REGNO 3/2011 estas poemo de d-ro Ulrich Matthias. Mi al ĝi faris melodion: mia kontribuo por kongreso, ĉar mi ne povas ĉeesti (almenaŭ ne korpe).

Salutas Albrecht KRONENBERGER

## La tero granda tablo estas

(originale verkita)




2.
La tero granda fonto estas.
Se ni ĝin ne detruas,
la akvo ĉiam fluas,
soifo ne plu restas.

3.
La tero laborejo estas.
Se agas kun sindono
ni por tutmonda bono,
mizero ne plu restas.

4.
La tero granda templo estas.
Malsamas la adoro.
Kun tolerema koro
malpaco ne plu restas.

LA TERO GRANDA TABLO ESTAS • M: Albrecht Kronenberger 2011-06-24 • E (originale verkita): Ulrich Matthias en DIA REGNO 3/2011, p. 72, inspirita de la germana poemo *Die Erde ist ein großer Tisch* de Rolf Krenzer

# Informetoj

## Ni laŭtlegas la Biblion! – jen ĝisdatigo pri la Aŭdebla Biblio

7 libroj finitaj: Psalmaro, Johano, Galatoj, Filemon, 2. Johano, 3. Johano, Judas
8 libroj legataj: La Predikanto, Sentencoj, Mateo, Luko, Agoj de la Apostoloj, Efesanoj, Tito, 1. Johano

Nun 9 personoj kontribuas al la projekto!

Kunlaborantoj:

http://audioboo.fm/keneto
http://audioboo.fm/Marko_it
http://audioboo.fm/zmjb1
http://audioboo.fm/Larisa
http://audioboo.fm/novkreitaĵo
http://audioboo.fm/Dachjo
http://audioboo.fm/gero
http://audioboo.fm/Hanjo
http://audioboo.fm/Rokyusan

Se iu volas kunhelpi, necesas nur komputilo kun mikrofono – aŭ eĉ nur poŝtelefono kun la programo Audioboo. Mi volonte helpos vin ankaŭ per sugestoj kiel solvi iujn ajn komencoproblemojn, aŭ kun Audioboo, aŭ kun Audacity.

Baldaŭ ni kreos paĝojn por faciligi al vizitantoj la aŭdadon de la legitaj Bibliaj libroj. Viajn ideojn tiurilate mi ankaŭ bonvenigas!

Amike salutas vin
Ken Caviness
caviness@southern.edu

## Nova bank-konto de KELI

Jen la numeroj de nia KELI baz-konto, al kiu ni ek de nun povas sendi monon:

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104
BIC: CMCIFRPP

Por francoj, la numeroj estas:
- Banko : 10096
- Giĉeto : 18248
- Kont-numero : 00036874801
- Ŝlosil-numero : 04

# Pri la kvakeroj en 15 lingvoj

La kvakera movado ekestis en Anglio, kaj pro tio la modernaj eŭropaj kvakeroj multe uzas la anglan internacie. Tial estas ĝojige ke nova interreta kurso, kiu prezentas kvakerismon al novuloj, aperas en 15 lingvoj, kaj ke inter tiuj estas Esperanto.

Kvakerismo estas sendogma religio kun radikoj en la kristanismo de la 17a jarcento, bazita sur silentaj kunvenoj, kaj la kurso celas konatigi interesiĝantojn pri la kvakeraj tradicioj kaj praktiko per interdiskutoj ĉirkaŭ klasikaj kaj klarigaj tekstoj.

Kvakera E-Societo
www.noos.ch/kes

Amike salutas
*Douglas Draper*, NO



# Marie Agatha van der Kooij-Waal

## — Rie —

Forpasis nia membrino s-ino Rie van der Kooij-Waal. Ŝi naskiĝis la 21-an de januaro 1920 kaj forpasis la 23-an de oktobro 2011.

Ŝi estis multjara membrino de KELI kaj ĝia nederlanda sekcio, patrino de Madzy kaj bopatrino de Gerrit Berveling. Gerrit eklernis Esperanton dank'al Rie kaj Madzy. La dankdiservo por ŝia vivo okazis vendredon la 28-an de oktobro en la remonstranta preĝejo de Hago kaj poste sekvis la kremacio en *Nieuw Eykenduynen,* ankaŭ en Hago.

Dum la lastaj jaroj Rie estis prizorgita en flegejo.

*Els van Dijk*

# ETERNECO

Eĉ se Ci ne estus
Mi inventus Cin
Kaj tiel Ci ekzistas por mi

Mi bezonas Cin
Ci estas por mi
La absoluta certeco

La unusence
Bela, bona kaj vera
La superĉio

Eĉ se Ci ne estus
Mi inventus Cin
Ĉar ne eblas vivi sen Ci

Ci estas ĉio por mi
La vero de la verecoj
La realo de la realaĵoj

Fabela tono de la muziko
Sankta ĉielarko de la koloroj
Ĉiela odoro de la mirindaj floroj

La velura kareso de la manoj
La varmego de la sufoka somero
La silento de la animfrostigo

Eĉ se Ci ne estus
Mi inventus Cin
Kaj tiel Ci ekzistas por mi

Mi donacas Cin al ĉiuj
Ke Ci estu ne nur por mi
Sed por la tuta mondo

Granda feliĉo: Ci estas por mi
Ja ne mi inventis Cin
De eterneco Ci ekzistas

'Sigmond Jùlia
Veano, 05.10.2011.